# SUDFRANCA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio « Languedoc-Roussillon »

5, Quai Vauban - 66000 PERPIGNAN (Pyrénées-Orientales) - ☎ 34.38.84

JARA ABONO : 5 F. C. C. P. 956-28 Montpellier

1-a Kvaronjaro 1974 — N° 50

# FEDERACIA KONGRESO
## EN BEZIERS

Partopreni en federacia kongreso signifas retrovi samfederacianojn; konatiĝi kun novaj, diskuti, sugesti kaj raporti pri la agado de U. F. E.; de la federacio, de la grupoj kaj de la izoluloj, ĝui samideanan etoson kaj praktiki la lingvon. La trideko da gesamideanoj kiuj venis en Béziers la 10-an de marto tion spertis.

La belega salono de la "Komerca ĉambro" estis je nia dispono la tutan matenon.

Sro Llech-Walter malfermis la kongreson per salutvortoj kaj relief-igante tri gravajn atingojn en nia federacio :

- Sro Raynaud gvidas kurson por gelaboristoj de firmo Crouzet en ALES laŭpete de la firmo mem.

- Sro Llech-Walter estis intervjuita de la regiona televido, la 15-an de decembro 1973 okaze de la Zamenhof-tago.

- Li estis ankaŭ akceptata de la akademia inspektoro por prelegi pri Esperanto en licej kaj kolegioj de Orientaj Pirenoj en la kadro de la "Kultura horaro 10 %". Li jam plurfoje prelegis por centoj da gelernantoj kaj ties geprofesoroj en pluraj liceoj kaj kolegioj de la departemento .

Federacia estraro. Ĉar la 11 federaciaj gekonsilianoj estis en Béziers finfine povis esti elektata la federacia estraro. Ĝi konsistas el Sro Llech Walter, prezidanto - D-ino Vierne, vic-prezidantino - Sro Amouroux, Sekreta-rio - Sro Deligne, kasisto kaj Sro Frus respondecos pri la federacia bulteno.

"Sudfrancia Stelo" Kiel decidite en Narbonne dum la lasta aŭtuna kunveno Sro Frus ricevos de Sro Deligne kvaronon de la bultena buĝeto, anticipe, je la fino de ĉiu trimestro.

D-ro Salan el Nîmes afable akceptis lingve korekti la artikolojn por la bulteno antaŭ la kompostado kaj la matricojn antaŭ la multobligado. Nia fede-racia ligilo fariĝos senriproĉa taknike kaj lingve. Ni kore dankas kaj gratu-las D-ron Salan pro tiu grava helpo. Li jam proponis, ke oni anstataŭu la nomon "Sudfranca Stelo" per "Sudfrancia Stelo". La propono estas akceptita sed ĝi efektiviĝos nur post la elĉerpiĝo de la stoko de jam pretaj frontpaĝoj.

D-ino Vierne atentigis, ke la grupoj devus sendi artikolojn pri siaj aktivecoj. Ĉar la celo de "Sudfrancia Stelo" estas ligila, estas dezirinde ke oni legu informojn pri la vivo de la grupoj.

Nun ĉio estas en ordo por ke ni havu unuarangan ligilon. Senprokraste pagu vian abonon, laŭeble la subtenan je 5,00 F.

Financa raporto - S-ro Deligne ĝin legis kaj vi ĝin trovos en tiu-ci numero.

Baloto por U. F. E. - (laŭ "Revue Française d'Espéranto" nº 283). Rajtis voĉdoni la aktivaj membroj de U. F. E. en 1973, do tiuj kiuj pagis 40,00 F. kaj ricevis la nacian revuon. Jen la rezulto de la baloto :

| | | |
|---|---|---|
| Rajtis voĉdoni : 43 | | voĉdonis : 24 |

1º) ĉu vi aprobas la agadraporton de U. F. E. por 1973 ?

| | | |
|---|---|---|
| Jes ; 24 | Ne : 0 | Sindeteno : 0 |

2º) ĉu vi aprobas la financan raporton ?

| | | |
|---|---|---|
| Jes : 24 | Ne : 0 | Sindeteno : 0 |

3º) ĉu vi aprobas la buĝeton 73-74 ?

| | | |
|---|---|---|
| Jes : 24 | Ne : 0 | Sindeteno : 0 |

Renovigo de triono de la konsilio : la nombroj indikas la ricevitajn aprobojn.

D-ro Albault : 23 - S-ino Ballaven : 13 - S-ro Ber ard : 23
S-ro Boyer : 9

S-ino Cash-Liouville : 19 - S-ro Despiney Dominique : 23
S-ro Gonin H. : 22

S-ro Luez : 19 - S-ro Saudian-Rousseau : 22 - S-ro Thierry : 19

Situacio de la aktivaj membroj de U. F. E. en nia federacio :

La nombro tre kreskis kompare al 1972 :

| | | |
|---|---|---|
| 1972 : 29 | 1973 : 43 | Diferenco : + 14 |

Notinda kaj gratulinda estas la bonega agado de ges-roj Volpellière en Nîmes, kiuj kreskigis la nombron en sia grupo ĝis 15 (nur 6 en 1972).

Persone mi opinias, ke ĉiu devkonscia federaciano devus fariĝi aktiva membro de U. F. E. abonante la nacian E-revuon. Pagi 8 frankojn kiel "simpatianto" ne sufiĉas kiam oni estas vera esperantisto. U. F. E. ne estas subvenciata (dum multaj lokaj grupoj jes) kaj ĝi vivas nur pere de la kotizoj de siaj membroj. Ni devas helpi la nacian asocion, kies filio estas la federacio.

Espereble tre baldaŭ, ĉar jam pasis kvarono de la kuranta jaro, multaj pagos la jarkotizon je 50,00 F. al sia klubkasisto, kiu transdonos la monon plej rapide kiel eble al S-ro Deligne.

Raportoj de ĉiuj grupoj kaj izoluloj :

Parolis reprezentanto de ĉiu grupo : Alès : S-ro Raynaud - Béziers : S-ino Authier - Montpellier : D-ino Vierne kaj S-ro Lentaigne Narbonne : S--roj Deligne kaj Jullès - Nîmes : S-ino Volpellière - Perpignan : S-ro Llech-Walter - Quillan : S-ro Régnier - Ankaŭ iom parolis S-ro Rousseau reveninta el Centrafrika Respubliko kaj nun provizore loĝanta en Montpellier.

Niaj venontaj federaciaj kunvenoj - La aùtuna laborkunsido (dum oktobro) kaj la federacia kongreso 1975 (iom antaù la nacia kongreso) okazos en Sète je fiksotaj datoj. D-ino Vierne sin anoncis por aranĝi ambaù kunvenojn.

La laborparto de nia kongreso en Béziers finiĝis je la 12-a.

Komuna tagmanĝo en le restoracio "La Daurade" arigis la gekongresanojn kiuj poste, plejparte, vizitis la riĉenhavan kaj mirindan muzeon de la "oppidum d'Ensérune". Dum 2 horoj gvidanto afable, verve kaj detaleme revivigis al ni la vivon, morojn kaj tradiciojn de forpasintaj civilizacioj, kiuj vivis tie plurajn jarcentojn antaù Kristo.

Ni devas gratuli kaj danki S-inon Authier kaj F-inon Terral, kiuj bone aranĝis tiun kongreson laboreman, kulturan kaj tre simpatian entute.

Je la horo de la rehejmiĝo jam ekfloris novaj planoj por venonta revido ĉu en St Etienne, por kelkaj, okaze de la nacia kongreso, ĉu en Hamburgo, ĉu alie. Post la somerferioj Sète akceptos nin. Espereble ni estos tre multnombraj, eble ankoraù pli ol en Béziers.

(protokolis Jean AMOUROUX federacia sekretario)






## NIMES

Plezurege nia Rondo akceptis denove Kimie Markarian-Ozawa, kiu jam vizitis nin en 1970.

Nia samideano Schlumpf organizis prelegeton en la kolegio Mont-Duplan, kie li instruas geknabojn.


Kelkaj el liaj kolegoj ĉeestis tiun kunvenon kun siaj klasoj kaj cento da infanoj povis rigardi la lumbildojn pri Japanio kaj speciale pri la vivo de la junaj japanoj kaj peti informojn de nia amikino. Ili ŝajnis tre interesataj.

La sidejo daùris 1 horon kaj duono en iom brua etoso !

Ni trafis la okazon disdoni prospektojn pri esperanto.

Vespere Kimie respondis al la demandoj de la grupanoj pri la organizado de la esperantista movado en Japanio kaj en Britio.

Renée VOLPELIERE




# FINANCA RAPORTO OKAZE DE LA KONGRESO
# EN BEZIERS
## Dimanĉo 10 Marto 1974, en Béziers

Karaj Geamikoj,

Ni devas rapidi, kiel kutime, kaj mi povos esti la plej eble konciza.

Tiu bilanco estas haltigita je la dato de la 3a de Marto 1974.

Kiel la antaŭaj, ĝi dividiĝas en tri ĉapitroj, kiuj estas : Kaseto, Sparkaso kaj Poŝtokonto, kiujn vi povos kompari kun tiuj de la pasinta jaro, pere de la ĉi-suba tabelo.

| Ĉapitroj | Kongreso 1973 | Kongreso 1974 |
|---|---|---|
| Kredito en la Kaseto | 37,65 | 48,25 |
| Kredito en la ŝparkaso | 250,53 | 781,00 |
| Kredito en la Poŝtokonto | 1 072,22 | 434,47 |
| Sumoj .................. | 1 361,40 | 1 263,72 |

Unuavide ni konstatas, ke nia havaĵo malpliiĝis je :

1 361,40 - 1 263,72 = 97,68

Tio devenas de la fakto, ke mi repagis al la grupo de Alès 40,00 por la organizado de la Kongreso, kaj 53,20 al la grupo de Nîmes por flugfolioj okaze de la opinio-sondo, laŭ letero de nia Prezidanto.

Aliparte, estas evidente, ke la nombro de niaj kotizantoj ne estas la sama ĉiujare.

KVARKOLORAJ AFIŜETOJ DE S-RO RAYNAUD : Tiu afero estis tre bona kaj alportis al ni profiton je 127,65.


SED NIA PLEJ GRAVA AFERO ESTAS SUDFRANCA STELO

Pri tio, mi kaptas okazon publike danki S-ror FRUS. Mi ofte grumblis kontraŭ li pro prokrasto en la apero de nia bulteno aŭ ĉar li ne tuj respondas kiam oni skribas al li. Sed, se tute certe, ĉiu laboras en sia sfereto por la bono de sia grupo, neniu el ni, ekster sia profesia laboro, laboras kiel li, por la Federacio.

# KRUCVORTOJ

## Horizontale ❋

1 – Malkaŝemulo (R)
2 – Lirika poemo – Ne sensperceptebla forto
3 – Pers. pronomo – Cirkonstancaro ĉe kiu iu vivas (R)
4 – Fari same kiel alia (R) – Plirapidigi (R)
5 – Posesiva adjektivo – Interkonsentita ĉesigo de laboro por difinita celo (R) – Sufikso esprimanta kolekton
6 – Literumante: Pura muzika sono kun difinita alto Trinkaĵo (R) – Palpa organo ĉe artikuloj
7 – Sufikso estintaj
8 – Ĝi estas tia, kia la semo – Maldense
9 – Arbedo uzata kiel spicaĵo – Nombro
10 – Unuo de elektra resistanco – El iu Eŭropa lando
11 – Taŭga pripensita procedaro – Maljesi
12 – Literumante: ujo – Hejmveo



R. Raynaud

## Vertikale ❋

1 – Kontinua (R) 2 – Forigi (R) – En tuta malgranda kvanto (R) 3 – Negacio – Nedifinita pronomo – Iama (R) 4 – Nomo de virino (R) – Muzikinstrumento (R) 5 – Tradicia observo de ceremonio (R) – En la okazo kiam – Grasa substanco uzata en kuirado 6 – Frukto (R) – Korpo per sulketoj 7 – Havanta flavecan ĝis ruĝecan koloron – Inverse: trinkaĵo 8 – Nerezisteble allogi – Pli malgranda ol la normala alteco 9 – Invado de mikroboj en organismo 10 – Demanda adverbo – Havi inklinon al – Sufikso 11 – Disrompita muro (R) – Kortobirdo – Inverse: en iu loko 12 – Nomo de litero – Luma bildo sendata sur ekranon.


* (R) – nur radiko
* La solvo aperos sur la venonta numero.

REĜUSTIGO – Krucvorto S.F.S. n: 49
Horizontale 5-3 legu:
«partie de fruit» (anstataŭ finit)
7-1 legu:
«se rapport à un vêtement sacerdotal»
Mia flanka malatento. PARDONON!
R. R.

Solvo de la krucvortoj aperinta sur la N. 49

| | | | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| O | B | S | E | R | V | A | T | O | R | I | O |
| C | I | T | R | O | ■ | P | E | N | E | T | R |
| C | E | R | E | B | E | L | ■ | ■ | A | I | N |
| A | R | I | ■ | I | L | A | R | O | ■ | N | E |
| S | E | D | ■ | N | E | T | A | ■ | S | E | N |
| I | ■ | E | ■ | E | V | I | T | I | ■ | R | E |
| O | R | N | A | T | A | ■ | ■ | P | I | A | N |
| M | O | T | E | T | ■ | B | U | ■ | L | I | T |
| N | U | ■ | R | E | V | O | L | V | E | R | ■ |
| E | S | P | E | R | A | N | T | O | ■ | E | ■ |
| L | S | ■ | E | I | ■ | O | R | I | V | ■ | D |
| S | E | N | S | E | M | ■ | A | R | A | B | O |

# 5 minutoj da intervalo



Vi ne povas resti ĉiam necerta rilate la profesion, kiun vi ŝatas.

Tiu kazo estas sen espera...

La lifto estas en paneo.

Ajnajn aferojn vi havu, tio restos malonge.

Doktoro kelkfoje mi timas ne esti Napoleono...

Rapidigu, iru preterpasi la alvenlinion kaj revenu tuj!

Se vi bone memoras, dum la kongreso en Nîmes, ni decidis fari apartan konton por la funkciado de SFS.

Tio donas la jenan rezulton :

| Lokaj Kongresoj | Enspezoj | Elspezoj | Diferencoj + | Diferencoj - |
|---|---|---|---|---|
| Balaruc | 167 | 30 | 137 | |
| Alès | 498 | 265 | 233 | |
| Béziers | 364 | 570 | | - 206 |
| Plusaj aù minusaj sumoj ........... | 1 029 | 865 | 370 | - 206 |

Tio signifas, ke ni komencos tiun jaron kun kredito je 370,00 - 206,00 = 164,00 Frankoj.

Ni devas ankaù konstati, ke inter Alès kaj hodiaù la nombro de niaj abonantoj revenis de proksimune 166 al 120, ke niaj elspezoj duobliĝis, kaj tute certe la prezo de la papero ne stagnos dum la venontaj monatoj : la gazetaro jam anoncis altigon de tiu prezo de 12 % ....

Do mi opinias, ke pri SFS ni devos adopti severajn antaùzorgojn severe aplikotaj.

SFS DEVAS vivi per si mem kaj ne helpe de flankaj rimedoj.

Kiel kutime mi estas je via dispono por respondi al ĉiuj demandoj, kiujn vi bonvolos fari.

Maurice DELIGNE.

## COTISATIONS 1974 DE LA FÉDÉRATION DU GARD POUR L'ESPERANTO

| | |
|---|---|
| Fédération ........................................................ | 2,00 F. |
| Abonnement Sud Franca Stelo | |
| a) Simple ........................................................ | 3,00 F. |
| b) de soutien ..................................................... | 5,00 F. |

C. C. P. Fédération départementale du Gard pour l'Espéranto


Montpellier : 1 857 07

## Nova sukceso en « Roussillon »

Nia pioniro Llech-Walter skribis al la Akademia Inspektoro por lin informi, ke li estas preta fari prelegojn pri Esperanto en ĉiuj kolegioj kaj liceoj en la kadro de la horara dek por cento.

La Akademia Inspektoro akceptis kaj sendis cirkuleron al ĉiuj estroj de duagrada edukado por ke ili rilatu kun S-ro René Llech-Walter, 5, Quai Vauban - 66000 - PERPIGNAN.

Jam Alvenis petoj de kolegioj kaj liceoj ; la unua prelego okazis la 11-an de Februaro.



## Esperanto en Francaj Liceoj kaj kolegioj

En la kadro de la dek procento-horaro por kulturaj aktivecoj en liceoj kaj kolegioj prelegoj kaj provlecionoj komencis en la departemento Pyrénées Orientales.

Prelegis kaj gvidis la kursojn René Llech-Walter el Perpignan ; S-ro Deligne, delegito de U. E. A. en Narbonne (Aude) ĉeestis kaj partoprenis, ĉar li deziras fari same en la departemento Aude.

Ĉe la fino de la prelego kaj kurso 138 gelernantoj donis nomojn kaj adresojn por ricevi dokumentojn kaj 25 enskribiĝis por eventuale sekvi kurson.

300 gelernantoj partoprenis la prelegon kaj kurson (2 sinsekve-po 150)

Se por la dokumentaro ne estas problem , oni cerbumas por trovi kursgvidantojn !

Nia kasisto S.ro DELIGNE ricevis el Beziers, **anoniman donacon** el 100 frankoj por helpo al SFS.

Ronéotypé pour la Fédération d'ESPERANTO Languedoc-Roussillon
**Directeur de la publication : Roberto FRUS - Ecole Maternelle E. Vaillant II - Z.U.P. — 30000 NIMES**
Dépot légal : 1er trimestre 1974